



ESPERANTO

NORMANDA BULTENO

unuigo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj (8 Euroj) Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

KONGRESU !!!

Post longa kaj pluvema vintro, nun finfine alvenas printempo. Ĉiuj ĝojas pro tio. Iom post iom revenas varmo kaj suno. La unuaj floroj ekaperas, kaj baldaŭ la birdoj ekkonstruos sian neston. Ĉie, post longa dormo, la naturo revivas.

Sed printempo ne nur estas revekiĝo de la naturo. Kun ĝi, ankaŭ revenas, interne de ni, vivo kaj energio. Ni ne lasu tiun energion perdiĝi. Ni profitu ĝin por pli vigle labori por Esperanto. Ni pli ofte kunvenu por interŝanĝi ideojn kaj praktiki la lingvon, des pli ke la vojoj ebligas pli facile vojaĝi. Inter tiuj kunvenoj, kompreneble troviĝas la grupaj kaj regionaj renkontiĝoj. Vi nepre partoprenu ilin, ĉar ili estas okazo por interŝanĝi spertojn, por fari komunajn projektojn, kaj ankaŭ por renkonti malnovajn amikojn aŭ konatiĝi kun novaj.

Sed ne sufiĉas ĉeesti regionan kunvenon. Se vi povas, vi ankaŭ ĉeestu landan kongreson de SAT Amikaro en Chambéry de la 15a ĝis la 17a de Aprilo kaj la nacian kongreson de Esperanto-France (UFE) en Limoges de la 2a ĝis la 4a de Junio (Pentekosta semajnfino); la ĉeftemo estos "2001, eŭropa jaro de la lingvoj". En tiuj kongresoj, vi povos diskuti pri pli vastaj problemoj, kaj verŝajne troviĝos en ili kelkaj eksterlandanoj kun kiuj vi povos paroli. Esperanto ne estis kreita por esti parolata nur inter samlandanoj!

Ankoraŭ pli valoraj estos la internaciaj kongresoj: Por la junuloj, la kongreso de TEJO en Strasbourg. En Nagykanizsa (Hungario), la kongreso de SAT kaj tuj poste la Universala Kongreso en Zagreb de la 21a ĝis la 28a de Julio. Tiam kongreson oni nepre devas ĉeesti almenaŭ unu fojon en sia vivo, kaj tion oni poste neniam povas forgesi, ĉar tie kaj nur tie, kvankam kunestas miloj da personoj el ĉiuj partoj de la mondo, la lingvaj baroj estas for, kaj oni malfacile imagas ke ekster tiuj kongresoj ili estas tiel fortaj. Tion, vi devas sperti. Vi ne bedaŭros vian tempon kaj monon.

Pierre POTTIER

RAKONTU ĈION AL NI !

Tiuj kiuj jam deĵoris ĉe esperantista budo, ne malofte havis la okazon paroli kun nekonata vizitanto kiu diris : "Ah! Esperanto! Nekredeble! Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas? Mi memoras ke mia avo, mia onklo, mia instruisto aŭ la bofratino de la avo de mia edzino scipovis ĝin"!!! (kaj senmanke tuj li aldonas: "Domaĝe ke tiu homama ideo ne sukcesis", sed tiu punkto ne estos tie traktata...)

Oni tiam ekkonscias ke esperantista movado jam de multaj jaroj ekzistas en nia regiono sed, ke rapide ĉio malaperis pri lokaj grupetoj, asocioj, aktivuloj kiuj agadis sur nia tereno. Tro ofte, morto de esperantisto signifas definitiva perdo de liaj agadoj, spertoj, leteroj, biblioteko. La familianoj ne transdonas la lasitajn dokumentojn al la movado, ĉar ili ne prikonscias la valoron de la afero kaj ne rilatas kun la eventualaj lokaj samideanoj de la forpasinto. La kluboj havas vivon kelkfoje mallonga; sen klubejo, kie eblus arĥivi ĉiujn spurojn lasitajn de antaŭaj generacioj, la malica vento forbalaos ĉion, aŭ la fajro ĝoje voros la modestajn kaj altvalorajn dokumentojn kiujn senatente ĵetos la heredantoj.

Hazarde, povas postvivi kelkaj memoraĵoj kiujn iu trovos en subtegmento, en brokantejo. En 1994, samideano de "Hérouville-Esperanto" vidis sur la frontpaĝo de loka gazeto "Liberté" la foton de poŝtkarto de la komenco de jarcento. Li konstatis ke la sendinto de poŝtkarto skribis en esperanto. Post interkonsento kun la kolektanto, ni sukcesis akiri tiun poŝtkarton. Skribis ĝin Sro Henri Laisney loĝanta 190 rue Saint Jean en Caen al Sro Richard 59 rue de l'Avalasse en Rouen. Li ĝin sendis la 13an de aŭgusto 1907 por ricevi informojn pri la okazonta Universala Kongreso en Cambridge "*Tiumomente mi metis ĉe mian butikon la verdan standardon kaj ĝi svingiĝos ĝis la fermo de l'kongreso*" (Tiu kongreso estis la tria Universala Kongreso; al ĝi aliĝis 1317 personoj) "*El Caen, neniu iris al la kongreso. Nur unu el nia rondo, loĝanta je 25 kilometroj iris tien kun sia familio*" Feliĉa afero ke ni trovis tiun ateston pri la unuaj jaroj de nia movado en Caen. Sed restas kelkaj demandoj : Kia komercisto estis Sro Laisney? Kiel nomiĝis tiu familio irinte al Cambridge? Kiom da anoj en tiu loka asocio? Kiam, kie ili kunvenis? Kion ili publike organizis? Ĉu ili akceptis eksterlandanojn? Kiu estis Sro Richard en Rouen?

Ĉu tiu Sro Richard gvidis grupon en Rouen? Kiel organiziĝis tie la movado? Dank'al mia frato, ne esperantista, kiu regule traserĉas la brokantejojn, mi nun scias ke ekzistis grupo en Sotteville-lès Rouen kies nomo estis "Esperanta Stelo". Tion atestas stampo sur kovrilo de altvalora libro : "Commentaire sur la grammaire Esperanto" de Louis de Beaufront. Eldonejo Hachette. 1906. Sur la tria paĝo, oni vidas malnovan subskribon, probable de la posedinto, sed la nomo ne estas klare videbla (...invoy) Ĉu la loka grupo jam ekzistis en 1906 kiam aperis la libro ? Kiu gvidis tiun grupon? Kiom da anoj? Dum kiom da jaroj? Kiaj rilatoj kun la urbaj instancoj?

Laŭ mi, nia regiona unuiĝo kaj la lokaj asocioj havas memoran devon por la venontaj generacioj. Pro tio, en nia loka grupo, ni havas oran libron kiun de pluraj jaroj (bedaŭrinde ne de la komenco), subskribas ĉiu gasto. Ĉiun trian monaton, ni kreas dosiereton pri niaj kursoj, artikoloj, fotoj. Ĉio estas nun en nia klubejo. La dokumentoj ne plu riskas malaperi ĉar ili fariĝis la posedaĵo de la asocio mem kies statuto kaj estraro garantias asocian vivon ne rekte dependantan de la vivo de niaj membroj.

Mi proponas ke ĉiu kiu travivis ion interesan en esperantujo faru raporteton, artikoleon, ĉu francelingve, ĉu esperante. Tiuj spertoj povas esti freŝdataj (ĉar oni bone scias ke ili baldaŭ estos malnovaj) aŭ tre malnovaj por la plej maljunaj inter ni. Raporto pri la ĵus gastigita Ĉino, Sinjoro Peng, en 2001, pri la vojaĝo de Gérard kaj Gigi en Japanio en 2000, tiom

Photo of the
card postcard
et post
publi
N° 181
octobre
de N.E.B.

valoras kiom la travivaĵoj de Jean Gibaux en Le Havre, Petro Pottier en Yvetot, Petro Kijo en Rouen, Sro Robiolle en Manche, Gesoj Michaud en Granville, Henri Rousseau en Mathieu, kaj multaj aliaj...

Ni rakontu kiel nomiĝis la esperantistoj kiujn ni unue renkontis, kiun rolon ili havis, kion ili rakontis al ni. Tiel, iom post iom ni reteksos la vivon de nia regiona movado, se ne de ties naskiĝo, tamen laŭ sufiĉe longa periodo. Tiu subjektiva memoro iam estos korektita per pli formala studo en la departementaj arĥivoj, per gazetaro kaj eĉ per...policistaj raportoj!

Aliaj regionoj jam faris tiun utilan laboron. Ni sciu de kie ni venas, por scii kien ni iros.

Yves NICOLAS
(Hérouville klubo)

*Por realigi tion, estus bone nomi iun arĥiviston. Disponi lokon por gardi arĥivojn. Kontakti familianojn de mortinta aktivulo por peti la lasitajn esperantaĵojn.
Alia artikoltemo por nia bulteno: "Kial kaj kiel mi fariĝis esperantisto"*

La Redaktanto P.Kijo

HEROUVILLE-ESPERANTO AKCEPTIS ĈINAN ĴURNALISTON

Sabaton 3an de Marto en stacidomo de Caen, kelkaj klubanoj akceptis Peng Zhengming, ĉina ĵurnalisto, 42-aĝa veninta el grandega urbo Wuhan (6M. da loĝantoj) en centrorienta parto de Ĉinio. Antaŭe, li vizitis amikojn en Rouen post dutaga restado en Parizo.

Dank'al Patrick, nia gasto iom malkovris la marbordon en Hermanville. Vespere, kelkaj klubanoj kuniĝis kun ili por manĝi en restoracio en Langrune apuda urbeto ĉemara. Dimanĉon la 4an, ili promenadis direkte al Arromanches fama en nia regiono pro la "elsipiĝo" dum la dua mondmilito.

Lundon tagmeze, mia edzo kaj mi kun Véronique alveninta iom antaŭe, ni plezure akceptis Patrick kaj Zhenming kaj sen prokraste altabliĝis ĉar mi devis post la manĝo partopreni ĥorprovon. Ĝuante la manĝaĵon, nia gasto afable respondis ĉiujn niajn multajn demandojn. Poste, Patrick kaj Véronique vizitigis lin la urbon Caen... Venis la momento rapide gustumi faman supon "Minestrone" tre ŝatata de nia amiko kaj taksata tre bona "laŭ la ĉina vidpunkto" (vivu la frostigita supo de franca firmao!..)

Vespere, kelke da 15 klubanoj kuniĝis en la domo de la asocioj por pridemandi nian invititon pri lia lando. Ĉiam tre afable, Zhengming respondis la multajn diversspecajn demandojn de scivolema ĉeestantaro. Poste, ni vidis lumbildojn de libro (tradukita en la ĉinan lingvon) de P.Etienne Donnet ilustrita de la fama karikaturisto Cabu.

Mardon, post nova ripoziga nokto, mia edzo kaj mi montris al nia gasto la modernan kvartalon de nia urbo: CITIS. La utiligon de la pluvoakvoj por krei surfostajn loĝejojn nia amiko taksis inteligenta; tiukaze li elvokis la surfostajn domojn de Chang-Hai. La promonado finiĝis en grandaj vendejoj de la firmaoj Renault kaj Citroën. Tio okazigis rimarkon de Zhengming: "Sur ĉinaj urbaj stratoj, la homoj svarmas; Francio estas surrada lando" kaj ni elvokis la eblan sufokadon de nia Tero se ĉiu ĉina kaj alilanda familio en la mondo posedus 1 aŭ 2 eĉ 3 aŭtomobilojn...Ĉu ne venis la tempo vivi alimaniere?

Tiun mardon la komuna vespermanĝo okazis ĉe Yves kaj la morgaŭon matene Laurette venis por veturigi Zhengming al Carolles kie atendis lin aliaj gastigemaj amikoj.

Ĝis revido Zhengming, eble en Ĉinio!

Odile MASSERON
en Hérouville, la 10an de Marto 2001

Niaj rilatoj kun niaj geamikoj el Malsupra Saksio

Ni daŭre interŝanĝas la bultenojn de niaj partneraj asocioj. La titolo de la bulteno de niaj geamikoj estas *"Esperanto in Niedersachsen"*. Kelkfoje, ili represas kelkajn el niaj artikoloj. Kiel nia, ilia ligilo estas dulingva.

Persona korespondado estas faciligita per Interreto.

Okaze de nova jaro, ni sendis al ili jenan mesaĝon kiun ili presis en sia bulteno:

Ni, normandaj esperantistoj, salutas ĉiujn samideanojn en Malsupra Saksio. Ni deziras al vi tre bonan jaron 2001 kaj sukceson en viaj klopodoj por antaŭenigi nian komunan idealon. Ni esperas ke niaj interrilatoj estos pli kaj pli firmaj. Niaj partneraj rilatoj estis, ĝis nun, nur skribaj; ni devos klopodi por ke baldaŭ, ili fariĝu personaj. Normandio estas tre bela regiono kiu tre suferis dum la milito. Pro tio, unu el niaj deziroj estas vivi en pli paca mondo.

Amikecajn salutojn.

AFORISMOJ DE LA ANTIKVA ROMIO

- Kontraktoj estas plenumendaj (Pacta sunt servanda) Bazo de ĉiu civilizita vivo
- Al astroj oni iras per malfacilaj vojoj (Ad astra per ardua)
- Unue vivi, poste fari filozofion (Primum vivere, deinde philosophari)
- Tiujn kiujn li volas pereigi, Jupiter (Quos vult perdere, Jupiter prius dementat)

unue frenezigas

Kaj tio sufiĉas, ili mem propraagade sin detruas

- La nombro de la stultuloj estas senfina (Stultorum numerus infinitus est)
- Vi suferos la leĝon kiun vi mem faris (Patere legem quam ipse fecisti)
- Ne estas longdaŭra, kio iam finiĝos (Non est longum quod aliquando finitur)
- Aŭskultu la alian partion (Audi alteram partem) Bazo de Justico
- Mi tion volas, ĝin ordonas, estu mia volo sufiĉa pravigo (Hoc volo, sic jubeo, sit pro ratione voluntas) Imperiestra formulo!
- Ŝvito ŝparas sangon (Sudor sanguinem parcat) Ĝustega militista formulo pri intensa trejnigo kaj kontruado de fortikigitaj kampoj. Ĝi povus esti plivastigita: "Laboro (cerebra kaj muskola) ŝparas larmojn"
- Povu kion vi volas, (sed) volu kion konvenas (Posse quod vellit, velle quod oportet) Formulo pri feliĉo kaj prudento
- Ili atakas la bonon kiun ili konstatas nome de la malbono kiun ili imagas (Bonum quod sciunt irrumpunt eo quod ignorant) Tertulianus, 197 P.K.
- Medicinisto kuracas, naturo resanigas (Medicus curat, natura sanat)

H. ROUSSEAU

Nelli KUBLANOVA kiu vizitis Normandion kaj estis akceptata de diversaj grupoj forlasis Rusion kaj almiĝis al Germanio. Ŝi vivas en rifuĝejo por enmigrantoj. Vi certe alportos feliĉon al ŝi skribante al: Nelli Kublanova, Kirschenallee 6 F

DE 14469 POSTDAM

Valerija CVETKOVA (filino de mortinta Barbara) havas sian vizon por restadi en Francio 2 monatojn. Ŝi alflugos la 1an de Aprilo. Ŝi estos en Normandio dum majo.

NOTRE REGION

Notre dernière Assemblée Générale a eu lieu le 2 Avril 2000 à Rouen. Nos statuts prévoient une assemblée par an. J' ai fait appel aux groupes ou aux individuels pour organiser l'A.G. 2001. Il n'y a eu aucune candidature. Il n'y aura donc pas de réunion régionale en 2001.

Cependant, j'estime nécessaire de faire connaître à nos adhérents les situations financières de l'Union des Espérantistes de Normandie (qui regroupe tous nos adhérents) et de la Fédération Normande d'U.F.E. (qui ne regroupe que les adhérents d'Esperanto-France)

Les 2 comptes ont été approuvés par notre contrôleur: Pierre Jouvin.

FINANCAJ RAPORTOJ 2000

Union des Esperantistes de Normandie CCP 283 40 H Rouen

RECETTES		DEPENSES	
<u>Au CCP le 31/12/1999</u>			
	<u>7145,19</u>		
Cotisations	5075,00	Bulletins 203 à 206	3241,70
Dons	300,00	Frais administratifs	282,00
		Subventions: Amanda	240,00
		Sub. Poma Semajnfino	1000,00
Total Recettes:	5375,00	Total Dépenses:	4763,70
		<u>Au CCP le 31/12/2000</u>	<u>7756,49</u>
	12520,19		12520,19

Fédération Normande d'UFE CCP 2348 06 C Rouen

<u>Au CCP le 31/12 1999</u>			
	<u>3949,72</u>		
Ristournes sur Cotisations	747,00	Frais Administratifs	90,00
		Déplacements à U.F.E.	312,00
		Total des Dépenses:	402,00
		<u>Au CCP le 31/12/2000</u>	<u>4294,72</u>
	4696,72		4696,72

Les frais administratifs seraient plus élevés si les responsables n'oubliaient pas de compter beaucoup d'appels téléphoniques, des affranchissements et des frais de déplacements !

Beaucoup de cotisations pour l'année 2001 ne nous sont pas encore parvenues.

Le Trésorier

Grand Quevilly / Rouen:

Regule kunvenas la grupo, ĉiusemajne.

Petro KIJ0 sukcesis aperigi en Paris-Normandie de la 16a de Januaro artikoleon kun titolo "Quelle langue pour l'Europe"

Domfront:

Sino Poupinet informis nin pri la morto de Sinjoro VERON la 27an de Februaro. Li estis tre fervora kaj aktiva esperantisto. Li organizis regionajn kongresojn kaj li helpis blindulojn tradukante esperantajn verkojn en brajlan alfabeton. Liaj arĥivoj estas transdonitaj al Hérouville-grupo.

Lisieux:

Tie kongresos Franca Katolika Esperanto Asocio de la 4a ĝis la 8a de Majo. Kontakto: F-ino Chaney, 56 rue Corvisart 75013 Paris kaj S-ro Albert Bessière 28 rue Camille Saint Saens 76000 Rouen

AFCE (Association Française des Cheminots pour l'Esperanto)

M. André Dubois 2 rue de la Grâce de Dieu 14123 Fleury sur Orne, responsable local de l'AFCE me communique:

Le siège de l'AFCE est : 7 rue de Château-Landon 75475 Paris Cédex

La cotisation annuelle est de 45 F pour les cheminots et de 120F pour les non-cheminots

Elle donne droit a) au journal mensuel "Fervojisto", b) aux cours par correspondance

L'antenne locale de Caen donne en plus des cours oraux (5 élèves actuellement) moyennant l'adhésion (50 F par an) à l'Union artistique et intellectuelle des cheminots de Caen (UAICC)

Y sont admis cheminots ou non cheminots

Portraits de femmes sans frontières

Au moment où la condition féminine soulève de nombreuses questions à travers le monde, diverses initiatives se développent afin de faciliter entre les femmes une concertation mondiale directe sans frontières et à tous les niveaux. L'une des principales barrières est celle des langues.

Au Japon, pour la Journée Internationale de la Femme célébrée à Hiroshima, des messages de soutien et d'encouragement ont été reçus en espéranto de France, d'Espagne, d'Islande, d'Italie, du Costa-Rica, des Pays-Bas, de Slovaquie, de Yougoslavie et du Vietnam malgré un appel lancé trop tardivement, donc peu répercuté.

Il se trouve qu'au même moment paraît la cinquième édition en espéranto du roman "Marta" d'Eliza Orzeszkowa (1841-1910) aux éditions KLEKS, l'un des principaux éditeurs polonais d'ouvrages scolaires, et ceci en même temps que "Le Tambour" du prix Nobel Günter Grass, aussi en espéranto.

"Marta" est un témoignage émouvant sur la condition féminine de cette époque. Malgré l'évolution des mœurs, ce roman conserve, hélas, une grande part d'actualité. Il a été traduit en 15 langues. Par sa traduction en espéranto, utilisée comme langue-pont pour la traduction en d'autres langues, il suscita un grand intérêt, notamment en Suède où il favorisa une prise de conscience sur la condition féminine, mais aussi en Chine, où parurent deux traductions, et surtout au Japon où il inspira des arguments en faveur de l'émancipation féminine, une étape vers les droits de la femme. Il mérite d'être découvert ou redécouvert. La traduction est du Dr Zamenhof en personne qui avait ainsi voulu servir la cause des femmes.

Le texte ci-dessus nous a été transmis par Henri MASSON

STAĜOJ EN KVINPETALO - en BOURESSE (86)

- Aliĝo : 150 F - Tutstaĝa tranoktado : 200 F (pour l'ensemble du stage)

- Ĉiu matenmanĝo : 25 F, - ĉiutagmanĝo : 49 F, - ĉiuvespermanĝo : 35 F

9 Avril au 13 Mars: Préparation du "certificat de capacité" avec P.Royer et G.Lagrange

17 Avril au 22 Avril: Histoire de la langue, conseils aux élèves et aux enseignants pour la partie orale de l'examen avec Claude Gacond

27 Avril au 1er Mai: Botanique avec Ru Bossong et Philippe Pellicier

5 Mai au 8 Mai: Hommage à Jeannine Vincent, ses traductions, sa vie

24 Mai au 27 Mai: Randonnée à pied avec Monique Dussenty, Thérèse Pinet

ESPERANTO-NORMANDIE deziras al vi : ĜOJAN PASKON